

# Eŭropa Bulteno

Marto 2018, Numero 179

## TEJO PARTOPRENOS EŬROPAN JUNULARAN RENKONTIĜON EN STRASBURGO



La 1an kaj 2an de junio 2018 TEJO partoprenos la Eŭropan Junularan Okazaĵon (European Youth Event) en Strasburgo kun delegacio de preskaŭ 30 junaj esperantistoj. Pluraj miloj da junuloj renkontiĝos dum la dutaga evento en kaj apud la Parlamentejo de Eŭropa Unio. Estos organizitaj konferencoj, plenaj sesioj kaj metiejoj, sed ankaŭ koncertoj kaj multaj aliaj neformalaj aktivaĵoj. Tie la partoprenantaj junularaj organizoj povos prezenti siajn celojn kaj aktivadojn kaj kune montri ke la onta generacio havas multajn dirindaĵojn.

La vicprezidanto de TEJO Konstanze Schönfeld (Tuŝka) partoprenis la pretigan renkontiĝon en Strasburgo kaj rakontas: “Mi kredas ke ĉi-jara evento estos tre interesa kaj vigla, pro tio ke ni festos 10 jarojn de YO!Fest kaj antaŭvidas pli ol dek mil junajn partoprenontojn. TEJO kunordigos la budejon “Laborante por pli forta Eŭropo”, organizos aktivaĵojn ene de ĝi kaj unuafoje ene de la Parlamentejo. La tuta organiza proceso kaj nia ĉeesto en Strasburgo estas unu el la plej gravaj kaj mojosaj okazoj por interkonatiĝi kun aliaj junularaj organizoj”. TEJO jam partoprenis la antaŭajn eventojn en 2011 kaj 2014, kaj kiel oficiala partnero en 2016.

Fonto: [tejo.org](http://tejo.org)

## LA ANGLA KAJ ALIAJ LINGVOJ EN SCIENCAJ PUBLIKAĴOJ

Antaŭ kelkaj tagoj mi ŝerce skribis: Laŭ enketo pri gazetoj, kiuj akceptas nur anglalingvajn artikolojn, ĉiuj tie publikigitaj artikoloj estis verkitaj en la angla.

Al simila rezulto venis alia enketo, kiu studis tiujn artikolojn, kiuj estas referencitaj de anglalingvaj indeksaj servoj. Ankaŭ ĉi tie montriĝis, ke la indeksitaj artikoloj, kiam la indeksa servo referencas nur anglalingvajn artikolojn, estis verkitaj ĉiuj en la angla. La instigo komenti la temon venis de la sekva artikolo: The Dangers of English as Lingua Franca of Journals (La danĝero de la angla kiel lingvafrankao de (sciencaj) gazetoj). Oni enkondukas la tekston per la rimarko, ke la scienco estas per tio damaĝata en la tuta mondo, laŭ la aŭtoroj Mary Jane Curry and Theresa Lillis

(<https://www.insidehighered.com/views/2018/03/13/domination-english-language-journal-publishing-hurting-scholarship-many-countries>).

Ofte ŝajnas, ke la angla estas preskaŭ centprocente uzata en la scienco. La aŭtoroj raportas, ke proks. 27 000 sciencaj gazetoj estas referencataj en la indeksoj de la "Web of Science" (WoS, Sciencita Reto), ekzemple en la ŝajne plej renoma "Science Citation Index" (Sciencita Citado-Indekso). Pli ol 9 000 sciencaj gazetoj kun sciencista prijuĝo de artikoloj estas publikigitaj en aliaj lingvoj; la franca (3500 gazetoj), la germana (2700), la hispana (2300) kaj la ĉina (1400) estas tiurilate gravaj lingvoj. Laŭ la aŭtoroj la plimulto de tiuj gazetoj ne eniras la ĝeneralajn citado-indeksojn, kio vivtenas la ideon ke la angla estus tutmonde la ĝenerala akademia lingvafrankao. Jen estas kiel ekzemplo indekso reta por hispanlingvaj artikoloj,

<http://www.redalyc.org>.

La problemo de publikigado en la angla estas interalie, ke la lokaj komunumoj (kiuj cetere financas la esploron) havas tiam problemon legi la artikolon. Bedaŭrinde aldona publikigo en dua lingvo kelkfoje kreas kopirajtan problemon.

Ni konsciu, ke la multa uzado de la angla lingvo ne estas nur sekvo de natura evoluo, sed ankaŭ de certaj reguloj kaj premoj, ofte preskaŭ ideologiaj. Antaŭ kelkaj jaroj mi legis artikolon de la tiama prezidanto de la Berlin-Brandenburgia Akademio de Sciencoj, kiu rakontis pri plendo: Tiun li ricevis de iu komisiono pri scienco, ĉar 20 % de la artikoloj de la Akademio-kunlaborantoj estis verkitaj ankoraŭ en la germana kaj nur 80 % en la angla. Mi plene konsentas kun li, ke ne ĉio devas esti verkita en la angla; tio estas simpla forĵeto de labortempo kaj efikeco - ĉefe, kiam temas pri aferoj forte ligitaj al Germanio. Sufiĉas de tempo al tempo verki pri tio angle, iom superrigarde.

Ankaŭ en universitataj lekcionoj oni ofte uzas la anglan antaŭ studentaro plejparte germanlingva. Mi nomas tion "moderna malraciigo", ĉar laŭ mia takso kutime la docento sukcesas esprimi en difinita tempo en la angla nur eble 90 procentojn de tio, kion li aŭ ŝi povus esprimi en la germana. Simile la studentoj sukcesas verŝajne kapti nur proks. 90 procentojn de tio, kion ili kaptus kaj memorus, se la lekcionoj estus en la angla. (Oni scias, ke enhavo legita aŭ aŭdita en fremdlingvo restas malpli bone en la memoro.) Sume mi supozas, ke la ideologie ordonita uzado de la angla en multaj kazoj signifas malraciigon, perdon de efikeco de almenaŭ 20 %. Kontraste mi tre bonvenigis la metodon de profesoro mia: Li enkondukis siajn lekcionojn por progresintaj studentoj (90 minutoj) per 10-minuta resumo de la antaŭa lekciono. Bela kompromiso por enkonduki nin en la sciencan lingvaĵon kaj tamen gardi

la efikecon. Jes, mi konscias, ke tio ne solvas la problemon de studentoj ne sciantaj la germanan - sed kiom da ili fakte estas?

Laŭ mia impresoj oni ĝenerale subtenas la anglan interalie ĉar oni ne vidas realisman alternativon. Pri Esperanto granda parto de la lingvistoj, de la ceteraj sciencistoj kaj de la publiko kredas komplete erarajn misinformojn. Kolekto de tiaj eraroj kaj mitoj pri Esperanto troviĝas ĉe [https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto#Eraroj\\_kaj\\_mitoj\\_pri\\_Esperanto](https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto#Eraroj_kaj_mitoj_pri_Esperanto). Aktualaj kazoj aperas en la grupo "Stop talking down Esperanto", <https://www.facebook.com/groups/250353055389540>. Tiom longe, kiom ni Esperanto-parolantoj ne energiplene laboras por diskonigi la veran situacion de Esperanto kaj de ties uzado, en sciencaj kaj eksterciencaj rondoj, ni havu nenian esperon pri iom pli granda progreso kaj mildigo de la problemo. La ideoj, kiujn homoj havas pri la mondo, estas la bazo de iliaj agoj; necesas ke la homoj havu realisman bildon pri Esperantujo.

Lu Wunsch-Rolshoven

Gazetara komisiito de GEA, ĉeforganizanto de NR

## **ĈI TIUN SEMAJNON NOVA LIBRO EN ESPERANTO ESTIS PREZENTITA EN LA BRITA PARLAMENTO**

Dum evento en la Brita Parlamento celanta prezenti la publikigon de la libro de Eric Lee, *La eksperimento: La forgesita revolucio de Kartvelujo* (1918-1921), la aŭtoro prezentis sian libron en Esperanto (kaj en la angla) al la Kartvela Ambasadoro en la Unuiĝinta Reĝlando, sino Tamar Beruchashvili.

La libro estas publikigita en Esperanto de Monda Asembleo Socia (MAS) kaj estas havebla en la reto. Plena listo de la vendopunktoj estas ĉi tie:

<http://www.ericlee.info/theexperiment/#buythebook>). La angla versio estis eldonita fare de Zed Books, laborista kooperativo en Londono.

Renato Corsetti, kiu ĉeestis la eventon, gvidis la tradukon, en kiu partoprenis esperantistoj el la tuta mondo.

La libro rakontas la historion de Kartvelujo dum tri jaroj antaŭ la soveta invado en 1921. Kartvelujo estis malofta ekzemplo de demokrata socialisma socio. Ĝi estis admirata de gvidantoj de la socialdemokrata movado en tiu tempo, kaj kelkaj el ili vizitis la landon.

La libro de Lee, kiu baldaŭ estos edonita en la kartvela lingvo, fare de Poezia Press en Tbiliso, aperas samtempe kun la celebros en Kartvelujo de la 100-a datreveno de la sendependeco en 1918.

Eric Lee

## ĈU POLIGLOTISMO SOLVOS LA MONDAN KOMPRENPROBLEMON?

Inter la 6-8a de aprilo 2018 okazos renkontiĝo de poliglota inĝenieroj en Alsoors ĉe Balatono por atingi faktan pruvon de la nesufiĉeco de plurlingvismo. Malgranda eksperimento montros la mankhavan komprenrezulton en societo de parolantaj de dek lingvoj, kun personoj konantaj 3-6 lingvojn. T.e. ankoraŭ necesas tradukado de parolaldonoj, ke ĉiu partoprenanto ĉion komprenu. Kunvenos inĝenieroj kun internacia sperto, laborantaj en diversaj landoj de la mondo, kiel ekz. en Svedio, Nigerio, Israelo, Germanio, Sudafriko, Usono, Rusio, Sovetunio, Serbio, Kroatio kaj Hungario. Ĉiu partoprenanto faras prelegeton, 20 min kun aldonaj 10 min. por demandoj.

Pliaj informoj pri la kunveno: [eumacko@aol.com](mailto:eumacko@aol.com), Tel. 0049 1525 4686475

Adreso de la kunveno: H-8226 Alsöors, Honvéd u. 20

<http://www.1hungary.com/map/alsoors>

Eŭgeno Macko

## LA PLEJ BONA IDEO POR ĈIUJ – RECENZO PRI TEATRAĴO

"House of Nouws", nederlanda teatrogrupo de junuloj kreis teatraĵon pri Esperanto kiun ili prezentis en prestiĝa tutsemajna kultura festivalo.



La redaktoro de edukado.net helpis la grupon per informoj, ekzercigis al la aktoroj la prononcadon kaj ĉeestis la ĉefprovon kaj la premieron. La prezento donis multajn okazojn por diskonigi informojn pri Esperanto, dum la festivalo kaj ankaŭ en la regionaj gazetoj. Ĉar

malmultaj esperantistoj povis spekti ĝin, Katalin verkis detalan prezenton pri la evento kaj ni publikigas ĝin ĉi tie en la horo de la lasta festivala ludo de la spektaklo, tiel ne ĝenante la ĝuon de la eventualaj spektantoj. Klaku al la bildo por atingi la PDF-dokumenton.

Ni petas tiujn, kiuj havas Facebook-paĝon, ke ili iru al [tiu ĉi ligo](#) kaj lasu gratulvortojn por la aktoroj. Ili havas kopion sur sia paĝo de tiu foto kaj legos viajn vortojn. Aldonu ankaŭ la landon el kiu vi skribas por konvinki ilin, ke Esperanto vere mondscale ekzistas kaj oni scias pri ilia laboro. Dankon.

Katalin Kováts

## **PONTA FESTO EN FRANKFURT/ODER**

Mi invitas vin elkore al la tradicia „Ponta Festo“ de la urbo Frankfurt (Odro), Germanio, 100 km oriente de Berlino, la 1-an de majo 2018. Jam la dekan fojon mi instalos informstandon pri Esperanto nome de Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio kaj Esperanto-Ligo Berlin. Do eta jubileo!

La aranĝo okazos inter 11:00 kaj 18:00 h ĉefe en la regiono de la urboponto inter Frankfurt (Odro) kaj Ślubice. En la proksimeco de la ponto (al norda direkto) ankaŭ instaligos nia informstando, rekonebla per Esperanto-flago.

Nia informstando memkompreneble bonege kaj konvinke denove demonstru, ke Esperanto ne nur funkcias, sed estas bona interkomprenilo inter la popoloj, do ankaŭ punta lingvo. Pro tio ankaŭ estus bonega afero, ke mi ne restos la unusola esperantisto dum la festo.

Tamen multe okazos dum tiu ĉi tago ambaŭflanke de la Odro-rivero kaj vi certe ne enuos. Vespere ni renkontigos en agrabla restoracio por komuna babilado.

Ronaldo Schindler

## **ESEO: IDENTECOJ**

Laŭmende mi verkis eseon pri identecoj en la slovena lingvo por la slovena scienca revuo Subkulture kiu aperis en numero 11 en la jaro 2012. Poste mi mem esperantigis ĝin kaj pasintjare aperis libreto kun la titolo IDENTECOJ. Ĉar mi opinias ke ĝi valoras la penon esti legata, des pli ke mi en ĝi klarigas iom nekutime pri la nocio identeco, mi jen prezentas ĝin al vi en EB je kelkaj partoj.

### **Enkonduko**

Sociaj sciencoj nuntempe konas du specojn de identecoj: individuan kaj grupan. Identeco estas konstanta identiga signaro, laŭ kiu estas eble rekonu individuon aŭ grupon. Mi opinias ke la individua identeco ne ekzistas, krom se ni egaligas ĝin kun la filozofi-religia nocio de animo. Ĉio alia en individuo konstante ŝanĝiĝas kaj nenio restas ĉiam la sama (identa). Iuj, ĉefe viroj, havas la tutan vivon la saman familian kaj personan nomon, sed ankaŭ tio ne estas

elemento de persona identeco, ĉar sendube estas pluraj homoj kun la sama familia nomo kaj antaŭnomo. Do en tiu ĉi verko mi parolos nur pri la grupidenteco; pri faktoroj laŭ kiuj oni povas rekoni personojn laŭ ilia grupaparteno, signoj laŭ kiuj oni povas scii al kiu grupo li/ŝi apartenas.

La homo estas laŭ sia naturo kaj genstrukturo socia estaĵo, kio signifas ke li ne povas vivi sen kunesto kun aliaj vivestaĵoj. Ne estas nepre ke tiuj estaĵoj estu homoj. Povas esti bestoj aŭ eĉ virtualaj estaĵoj (aktivaj en sociaj retoj aŭ pasivaj kiel homoj parolantaj al ni el radio, televido, el gazataro, kiuj ion mesaĝas al ni sed ne respondas al niaj demandoj). Ĉio alia, al kiu grupo aŭ grupoj unuopulo apartenos kaj ĉu tiu aparteno estos fortega aŭ nur surfaca dependas de la socia ĉirkaŭaĵo.

Tuj post la naskiĝo la infano iĝas membro de grupo en kiu enestas ĝi kaj la patrino. Se la patrino mortas dum la nasko, ĝi iĝos membro de grupo en kiu enestos ĝi kun persono kiu transprenos ĝin kaj zorgos pri ĝi. Aliaĵe ĝi mortos. En la daŭro de la vivo la nombro de grupoj al kiuj la infano ekapartenas konstante kreskas. Kiam la infano komencas konscii pri sia socia ĉirkaŭaĵo, ĝi iĝas membro de grupo kun sia frato aŭ fratino, kun kiuj ĝi ludas, ĝi ekkonscias pri sia patro, pri la familio, sekvas grupoj kun geamikoj el najbareco aŭ parencaĵo aŭ el infanĝardeno. La nombro de grupoj el po du personoj al kiuj oni apartenas (mi kaj amiko, mi kaj frato, mi kaj fratino, mi kaj patrino, mi kaj onklo, mi kaj avo...) konstante pligrandiĝadas. La samo okazas pri pli grandaj grupoj (tripersonaj ekz.: Mi kaj mia frato kaj fratino, mi kaj miaj gepatroj, mi kaj miaj du plej bonaj amikoj... kvarpersonaj, kvin-... kaj plurpersonaj). Ju pli ni pliaĝiĝas, la nombro de tiuj grupoj des pli kreskas kaj ni ne plu konscias pri ili. Ĉi tien apartenas ankaŭ grupoj kiel: mi kaj mia hundo, mi kaj mia kato, mi kaj mia papago aŭ mi kaj komentisto en la televido, al kiu mi kredas, mi kaj geamikoj en socia virtuala reto (iuj kiujn mi persone konas sed mi neniam vidis ilin)...

Aparteni al iu grupo ne estas la samo kiel iun koni. Ofte vi povas vidi malproksiman najbaron, kiun vi salutas, sed vi havas neniujn aliajn kontaktojn kun li. Li estas via konato sed inter vi troviĝas neniua emocia ligo. Kun tiu persono vi ne havas socian rilaton kaj kun li/ŝi vi ne formas grupon.

Grupo ekzistas tiam kiam ekzistas sento de aparteno en ĉiu el la membroj, kiun ni povas priskribi kiel preteco de individuo pri senkondiĉa sinofero por alia persono en la grupo aŭ por la tuta grupo. La preteco pri sinofero havas diversajn gradojn de forteco: de tre malforta (esti preta doni iom da sia tempo por aliulo aŭ aliuloj) ĝis fortega kiam oni pretas por alia persono en la grupo aŭ por la grupo mem fordoni la propran vivon. La homo kiel socia estaĵo do apartenas al sennombraj grupoj, sed lia aparteno havas diversajn gradojn je kio influas diversaj faktoroj:

Ni distingas du specojn da grupoj al kiuj la individuo apartenas:

1. Malgrandaj grupoj en kiuj ni persone konas ĉiujn membrojn, kie la apartensento evoluas baze de konfido. Dum la vivo la infano evoluigas konfidon al siaj gepatroj, ĉar ili sinoferas por ĝi kaj ebligas al ĝi vivi. Ĝi evoluigas konfidon al siaj gefratoj kaj geamikoj ĉar ili instruas ĝin pri la reguloj kiel kondukti en la socio kaj eĉ se ili punas ĝin, la infano akceptas tion kiel utilaĵon por la posta vivo (se ĝi sentas ke la punado estas konsekvenca kaj edukcela). Se la kondiĉoj en tia grupo ŝanĝiĝas (ekz. la patro iĝas alkoholulo kaj senkaŭze batas la patrinon kaj la infanon), la konfido kaj la kvalito de la grupo malboniĝos. Se oni ne plu povas fidi al la propra patro, oni ne plu estas preta sendondiĉe sinoferi por li kaj la apartensento malaperas.

Tio validas ankaŭ por grupoj kun bestoj (ekz. mi kaj mia hundo). Kiam iu hundo vagadas malsata surstrate kaj vi ofertas al ĝi nutraĵon (senkondiĉa helpo), tiu hundo unue estos tre nefidanta, sed la malsato superos la malfidemon kaj ĝi rapide prenos la manĝon kaj forkuros. Kiam vi ripetos tion kelkfoje, la konfido kreskos kaj la hundo kun ĝojo venados al vi kaj fine plene fidos al vi. Nun ankaŭ la hundo klopodos fari ion por vi. Ĝi bojos al nekonatoj kaj tiel montros, ke ĝi estas via kaj ke ĝi volas vin ŝirmi.

Por tiu speco de aparteno kiu ekestas baze de evoluanta konfido ne estas necesaj vortoj kaj la homa lingva komunikado.

2. Alia speco de aparteno estas aparteno al pli grandaj grupoj en kiuj oni ne konas persone ĉiujn membrojn. Tia apartensento evoluas per la helpo de edukado por kio estas necesa persvadado far homoj per lingvo. Tiu formo estas karakteriza nur por homoj. Ĝi evoluas per edukado pri valoroj, kiujn iu grupo opinias gravaj kaj baze de kiuj funkcias socia ordo en la koncerna grupo. Aparteni al sia urbo (vilaĝo), sia regiono, popolo, religio, filozofia skolo, politika opcio, signifas ke unuopulo akceptis ideologion de tiu grupo per edukado. Ideologio estas aro da ideoj kiuj prezentas sociajn valorojn provantaj respondi al la demando: kial mi vivas? Se mi akceptas la edukajn valorojn de kristana ideologio (valorojn kaj ideojn kiuj tiujn valorojn klarigas), mi konfidos al aliaj kristanoj, kiuj akceptis la saman ideologion kaj klarigojn pri tio kial ni vivas kaj mi estos preta multon oferi por homoj kun la sama ideologio (kun la samaj konvinkoj, kun la sama kredo) kaj samtempe mi ne konfidos al tiuj kiuj ne estas sammaniere edukitaj. Se en lernejo kaj per publikaj medioj oni sukcesas konvinki min ke la valoroj de mia popolo estas tre gravaj kaj ke ili plej konvynke klarigas pro kio oni vivu, mi estos profunde konvinkita apartenanto de la koncerna popolo. Mi komplete fidos al miaj gvidantoj kaj pretos pro ilia postulo eventuale oferi eĉ la propran vivon por mia popolo. Al sia popolo ni povas aparteni per diversaj intensecoj. Iu kiu antaŭ nelonge venis al la lando el alia lando ja akceptos iom da identeco de nova popolo (alokaze li/ŝi devus forlasi tiun novan socion), sed lia konvinko ne estos tre intensa. Tiu persono aŭ ne bone komprenas la novajn valorojn aŭ konscias ke li antaŭe havis alian identecon (kaj ankoraŭ ĝin posedas) kaj nun ne scias kiu estas pli grava. Tiu persono havas malforte evoluantan nacian identecon, ĝi estos preta ĉi tie vivi kaj senkondiĉe oferi iom da sia tempo por la nova popolo, sed ne pli. Alia persono kiu longatempe vivas en la sino de sia popolo kaj estas edukita en la spirito de la popola identeco (lernejo, historio, literaturo, valoroj...) sentos fortan apartenon, amon al sia popolo kaj fieros pri ĝi. Tamen, se temas pri normala persono, kiu vojaĝis ankaŭ en aliaj landoj kaj kontaktis homojn de aliaj popoloj, tiu komprenos ke ĝia popolo ne estas la nura en la mondo kaj ke ankaŭ aliaj havas la rajton ekzisti. Tiu persono pretos pro solidareco kun la propra popolo oferi multe pli da sia tempo kaj mono, sed ne plene senkondiĉe. Tiu personon ni povas nomi sana patrioto. Sed persono kiu senkondiĉe akceptos ĉion, kion oni encerbigis al ĝi per la eduko kaj akceptos ke ĝia popolo estas la plej bona, persono kiu verŝajne ne vojaĝis ekster la teritorio de la propra popolo kaj ne konas fremdajn lingvojn, estos preta interbatiĝi kun fanoj de alilanda futbala teamo aŭ eĉ oferi la vivon (se okazos milito aŭ se tion la popolgvidantoj postulos). Tiu persono pretos plenumi eĉ la plej hororajn agojn kontraŭ apartenantoj de aliaj popoloj, pri kiuj li/ŝi estas konvinkita ke ili endanĝerigas ĝian popolon. Tiu estas ŝovinisto aŭ naciisto. La intenseco de aparteno feliĉe konstante ŝanĝiĝas. Ankaŭ egaj ŝovinistoj (pretaj oferi sian vivon) ŝanĝiĝas al naciistoj kaj al patriotoj, eble eĉ al grandaj dubantoj, se la kondiĉoj ŝanĝiĝas.

Zlatko Tišljarić

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de marto 2018

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, TEJO-org, Eric Lee, Lu Wunsch-Rolshoven, Ronald Schindler, Katalin Kováts

Kontakto: ztisljar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

